# ?inio pledas en UN por paco kaj multflankismo.



Beijing, 25 sept (RHK) ?inio ratifas la sintenon favore al multflankismo, la paco kaj evoluo tutmondaj, kadre de la ?enerala asembleo de UN en ties 73-a laborperiodo.

La ?ina ministro pri eksteraj rilatoj, Wang Yi, esprimas la sintenon de sia lando pri tiuj temoj, sed anka? pledas por subteni la a?toritatecon de UN kaj prezentos proponojn por solvi gravajn aferojn de la internacia kaj regiona panoramo, raportas la informagentejo Prensa Latina.

?inio profitas ?iujn eblajn scenejojn por subteni la protekton de tiuj principoj, ?ar en la mondo kreskas protektismaj fortoj kiuj frenezigas la mondan ordon, la rilatojn inter la landoj kaj la sekurecon.

Hiera?, kadre de la pintkunsido por paco Nelson Mandela, la ministro emfazis la bezonon fortigi tiujn principojn ?ar nur tiel oni povi alfronti aliajn defiojn tutglobajn kiel mizero, malegaleco kaj malsato.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/172365-cinio-pledas-en-un-por-paco-kaj-multflankismo

**Radio Habana Cuba**